

Kiel okazis la kazo de Maria Kolono

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
la 11-an de marto 2020

Motto:

Zalíbilo se Královně andělských sborů

vtisknout svou tvář ne do mramoru,

leč v kámen té těžce zkoušené kacířské země.

Moto:

La Reĝino de anĝelaroj ekvolis

sian facon ne enmarmorigi,

sed en tiu sufereganta hereza lando ĝin enŝtonigi.

Václav Renč: *Pražská legenda* / Praga Legendo
Socialisma malliberejo en Leopoldov, 1957

Nur la 23-an de januaro 2020, post multe da politikaj, amaskomunikilaj, ekleziaj kaj artistaj „bataloj“ praga urbestro permesis renovigon de Maria Kolono, kiu la 3-an de novembro 1918 estis neniigita en Malnovurba Placo en Prago.

Kio estis Maria Kolono

La Kolono estis kreita el bohemia sabloŝtono, kiu estis minita en nuntempe jam neekzistanta ŝtonminejo apud Žehušice. En la jaro 1650 piuloj ĝin konstruigis por danki al Virgulino Maria, kiu helpis al praganoj defendi nian ĉefurbon kontraŭ svedaj konkerantoj en la jaro 1648.

La Kolono staris en la loko, kie antaŭe troviĝis paladio el Stará Boleslav. La Paladio de Bohemia Lando estis defenda urba bildo de Virgulino Maria kun Jesuo (metala reliefo, 19 × 13,5 cm), antaŭ kiu katolikoj preĝadas. Dum tridekjara milito (1618-1648) en Stará Boleslav saksaj soldatoj la paladion ŝtelis kaj alportis ĝin en Pragon al kolonelo **Laŭrenco Hoffkirk**, kiu Virgulinon Marian arde malamis. La 29-an de marto 1632 la kolonelo en Malnovurba Placo pendigis unu lokan metiiston kaj la paladion najlis sur pilorion por malhonorigi katolikojn.

Maria Kolono estis 15,83 m alta. Statuo de Virgulino Maria la Senmakula sur pinto de la Kolono estis kovrita per oro. Kvar anĝeloj simboligis saĝecon, justecon, kuraĝon kaj moderecon, kiuj venkas fortojn de malbono (simboligitajn per du diabloj, leono kaj drako). En niĉo estis gotika bildo de Virgulino Maria Rejna el la 14-a jarcento.

Nomo de ĉefa arĥitekto, kiu la Kolonon kreis, ne estas konata. Ornamaĵoj de la Kolono estas opusoj de **Jan Jiří Bendl**, **Arnošt Jan Heidelberger**, **Stanislav Goldschneck** kaj **Abraham Melbera**. La 13-an de julio 1652 la kolonon sanktigis kardinalo **Arnošt Harrach**. Imperiestro **Ferdinando la 3-a Habsburga** kaj lia filo **Ferdinando la 4-a Habsburga** partoprenis En la ceremonio imperiestro **Ferdinando la 3-a Habsburga** kaj lia filo **Ferdinando la 4-a Habsburga** partoprenis .

La Kolono servis kiel astronoma helpilo (praga meridiano), laŭ kiu estis korektita funkcio de horloĝo en turo de Malnovurba Urbodomo.

La 3-an de novembro 1918 la kolono estis barbare malkonstruita kaj neriparable disrompita.

Kontraŭdiroj

Kiam mi diskutis sur sociala reto kun la homoj, kiuj la renovigon ne volas, mi estis ŝokita de ilia konduto. Ili diskutis precipe anonime, tial ili kaŝis nek sian malbonan konduton nek malbonajn sciojn de ĉeĥa gramatiko kaj eŭropa historio. Ekzemple praga urbestro, kuracisto **Zdeněk Hřib**, certe edukita, moderna juna viro, eksplikis al mi, ke la Kolono sur Malnovurba Placo en Prago estas simbolo de habsburga malliberigo de ĉeĥa nacio. Vere li ripetis nur tion, kion en socialismaj lernejoj lin, liajn gepatrojn kaj geavojn instruis komunistoj.

Ĉefaj kontraŭdiroj de malamikoj de renovigo de Maria Kolono estas tri:

1. *„Netaŭgo de najbareco de Monumento de Magistro Johano Hus kaj Maria Kolono.“*
2. *„Maria Kolono estis monumento de batalo apud Blanka Monto. Ĝi staris sur loko de ekzekuto de 27 ĉeĥaj nobeloj (1621). Ĝi estis simbolo de rekatoligado post subpremo de leviĝo de evangeliaj nobeloj (1618-1620).“* (Rekatoligado estas komparata kun totalisma reĝimo.)
3. *„Maria Kolono estis malhonorigo de ĉeĥa nacio, ĝian konstruadon finance subtenis imperiestro Ferdinando la 3-a Habsburga, tial ĝi estas habsburga monumento, netaŭga por sendependa ŝtato. Ĝia renoviĝo estus negado de evoluo de ĉeĥa historio.“*

Mi estis edukita en socialisma baza lernejo (1961-1970), mezlernejo (1970-1974) kaj Bestkuracista Universitato (1974-1980). Tial mi bone scias, ke instruistoj de historio dum socialismo estis en pli malbona situacio ol ekzemple iliaj kolegoj matematikistoj. La instruistoj de historio povis instrui nur tion, kion al ili permesis kaj ordonis socialisma reĝimo. Tial la instruado de historio estis instruata kripligite kaj fragmentite: *„antaŭ la batalo apud Blanka Monto ni havis belegan historion, kies la plej bona parto estis husana epoko (1420-1434) – poste la tragedio batalo apud Blanka Monto okazis – Habsburgoj nin 300 jarojn subpremis kaj germanigis, al ili helpis katolikoj, precipe jezuitoj, nur Granda Oktobra Revolucio estis signifa – sekvis la dua mondmilito kaj helpo de Sovetunio, nia la plej bona kaj fidela amiko...“*. Multaj historiaj eventoj tiam estis aŭ neglektitaj aŭ tabuigitaj.

Bohemia verkisto **Alois Jirásek** estis mezlerneja instruisto de historio, kiu laboris 14 jarojn en Litomyšl kaj poste en Prago. En la jaro 1921 li forlasis romkatolikan eklezion. Politike li apartenis al dekstruloj (Ĉeĥoslovaka Demokrata Partio). Li estis talentita kaj laborema verkisto, kiu prisribis tutan ĉeĥan historion. Lernantoj devis legi liajn librojn. Bedaŭrinde Jirásek uzis ŝematizmon. En liaj libroj ĉeĥoj estis bonaj, germanoj malbonaj, nekatolikoj (precipe husanoj kaj evangelikoj) estis bonaj, katolikoj ofte estis malbonaj. El katolikoj plej malbele jezuitoj estis priskribitaj. Tial multe da generacioj sub la influo de libroj de Alois Jirásek opiniis, ke kristana religio estas neutila, eĉ malbona.

Rezulto de komunisma teroro, kiu celis precipe kontraŭ romkatolika eklezio, kaj sistematika kontraŭreligia edukado de homoj kaŭzis nuntempajn malsimpatiojn de multe da civitanoj al religioj. En Ĉeĥa Respubliko estas 85 % da ateistoj. La unua plej ateisma ŝtato de Eŭropo estas Albanio, la dua estas Ĉeĥa Respubliko. Kredantoj, precipe pastroj, ofte estas mokataj. Se reĝisoro de nekvalitaj filmaj komedioj bezonis iun komikan personon en sian opuson, kiun li uzis? Romkatolikan pastron.

Tial mi ne miras, ke multaj nuntempaj politikistoj estas sub fortaj influoj de verkaĵoj de Jirásek kaj precipe komunisma (ateisma) edukado, kiu sistematike venenigis ne nur iliajn animojn, sed antaŭe eĉ animojn de iliajn gepatrojn kaj geavojn.

Respondoj al la kontraŭdiroj:

1. La kontraŭdiro: „*Netaŭgo de najbareco de Monumento de Magistro Johano Hus kaj Maria Kolono.*“

La respondo:

Johano Hus estis katoliko. Danke al liaj verkaĵoj ni nuntempe bone scias, ke li tre estimis Virgulinon Marian.

Monumento de Magistro Johano Hus estis konstruita nur en la jaro 1915. Aŭtoro de la Monumento estis skulptisto **Ladislav Šaloun**. Hus en statuaro de Šaloun aspektas alie ol vera Hus. Šaloun prezentis Huson kiel maldikan asketon, sed ni scias, ke Hus, kiu ŝatis bieron, estis dikulo same kiel la katolikaj pastroj kaj episkopoj, kiujn li kritikis. Sed Šaloun bone kreis sian statuaron kiel la horizontalo. Maria Kolono estis vertikalo, tial ambaŭ konstruaĵoj kunekzistas en harmonio (vertikalo + horizontalo). En Malnovurba Placo estas sufiĉe da loko por ambaŭ opusoj. Dum tri jaroj (1915-1918), kiam ambaŭ konstruaĵoj kunekzistis en Malnovurba Placo, ilia najbareco neniu incitis.

2. La kontraŭdiro: „*Maria Kolono estis monumento de batalo apud Blanka Monto. Ĝi staris sur loko de ekzekuto de 27 ĉeĥaj nobeloj (1621). Ĝi estis simbolo de rekatoligado post subpremo de leviĝo de evangelikaj nobeloj (1618-1620).*“

La respondo:

Monumento de batalo apud Blanka Monto ne estas Maria Kolono sed la preĝejo de Virgolino Maria la Venkistino, kiu situas sur Blanka Monto.

Maria Kolono estis konstruita ne en eksa loko de ekzekuto, sed en la loko, kie netolerema nekatoliko Hoffkirk en la jaro 1632 malhonoris bohemian paladion. Ne ĉiuj el 27 ekzekutitaj ribelantoj estis nobeloj kaj ne ĉiuj estis ĉeĥoj.

Maria Kolono ne estas simbolo de rekatolikado. La rekatolikado neniam povas esti komparata kun pli kruelaj totalismaj reĝimoj (komunismo, faŝismo).

Mariaj kolonoj estis konstruitaj en multaj urboj kaj urbetoj de nia lando. Neniu ilin konsideras de simboloj de Habsburgoj, rekatolikado aŭ germana lingvo.

3. La kontraŭdiro: „*Maria Kolono estis malhonorigo de ĉeĥa nacio, ĉar ĝian konstruadon finance subtenis imperiestro Ferdinando la 3-a Habsburga, tial ĝi estas habsburga monumento, netaŭga por sendependa ŝtato. Ĝia renoviĝo estus negado de evoluo de ĉeĥa historio.*“

La respondo:

Maria Kolono ne estas malhonorigo de ĉeĥa nacio, kiu sukcese transvivis tridekjaran militon kaj heroe defendis sian ĉefurbon kontraŭ malamikoj. La imperiestro Ferdinando la 3-a la konstruadon finance subtenis, sed pro tio la Kolono ne fariĝis monumento de Habsburgoj. Ĉu ekzemple Nacia Teatro en Prago estas monumento de Habsburgoj? Certe ne. Sed pli ol 50 % da mono por konstruado de ĉeĥa Nacia Teatro en Prago dediĉis Habsburgo, la imperiestro **Francisko Jozefo la 1-a**, kaj aliaj dinastianoj.

Habsburgoj, jezuitoj, defendo de Brno kaj Prago kontraŭ svedoj, germanizado

Socialismaj instruistoj, kiuj devis instrui laŭ komunistaj ordonoj, kune kun socialismaj amaskomunikiloj kaj nuntempaj ateistoj kreis miksaĵon de mensogoj: „*Ĉeĥa nacio post*

batalo apud Blanka monto 300 jarojn suferis de regado de germane parolantaj Habsburgoj, kiuj kun helpo de jezuitoj kaj aliaj katolikoj ĝin volis germanigi.“ Precipe la „300-jara suferado“ estis ofte uzata politika frazo. Tial mi batalas kontraŭ komunisma sencenca unuiĝo „Habsburgoj + germanizado + jezuitoj“.

Habsburgoj

Laŭ komunistoj ĉiuj Habsburgoj estis malamikoj de niaj nacioj (ĉeĥoj, moravianoj kaj silezianoj). Ĉu vere jes?

Hejma ĉeĥa reganta dinastio de Primislidoj elmortis en la jaro 1306, kiam juna reĝo **Venceslao la 3-a** (lasta Primislido) estis murdita en Olomouc. Poste regis dinastio de Luksemburgoj (**Johano Luksemburga, Karolo la 4-a, Venceslao la 4-a kaj Sigismundo Luksemburga**). Por nelonga tempo super ni regis Habsburgo, **Albreĥto Aŭstria**, kiu estis bofilo de Sigismundo. Lasta reĝo, kiu estis ĉeĥo, estis **Georgo el Poděbrady**. En la jaroj 1469-1490 en Moravio regis kontraŭreĝo **Matiaso Korvino**, kiu estis hungaro. Regado de pola dinastio Jagelo finiĝis en la jaro 1526, kiam juna reĝo **Ludoviko Jagela** dronis en marĉo post malvenkita batalo kontraŭ turkoj apud Mohács.

Habsburgoj alvenis paceme. Kial? La dinastio Jagelo havis kontrakton kun Habsburga dinastio, ke se iu el la dinastioj elmortos, ekregos membroj de alia dinastio. En la jaro 1526 Jageloj elmortis, tial Habsburgoj heredis la regadon. **Ferdinando la 1-a Habsburga** estis elektita kiel bohemia reĝo la 26-an de oktobro 1526.

Nekatolikaj nobeloj aranĝis du kontraŭhabsburgajn ribelojn. La unua ribelio okazis en la jaro 1547. Ĝi estis malbone preparita kaj facile venkita. Punoj estis moderaj (nur kvar ribelantoj estis ekzekutitaj). La dua ribelio, kiu komenciĝis la 23-an de majo 1618, kiam el fenestro de Praga Kastelo estis forĵetitaj **Vilém Slavata el Chlum kaj Košumberk kaj Jaroslav Bořita el Martinice**, kiuj estis potencaj oficistoj (guberniestroj) de Ferdinando la 2-a, kun ilia skribisto **Filip Fabricius**, signifis veran perfidon de la imperiestro, al kiu antaŭe la ribelantoj promesis fidelecon. La ribelantoj varbis armeon kaj elektis boheman reĝon **Frederikon Palatinatan**, kiu estis germano. Ekde tiu momento la ribelantoj ne povis esti konsiderataj batalantoj por iuj idealoj. Ili kondutis malbone, kiel perfiduloj. Batalo apud Blanka Monto, kiu okazis la 8-an de novembro 1620, nur montris, kiel malforta estis opozicio kontraŭ Ferdinando la 2-a. Kiam armeo de la ribelantoj estis venkita, ili havis ŝancon defendi Pragon. Sed la ribelantoj tion ne faris. La bohemia reĝo Frederiko Palatinata fuĝis kiel ektimigita puberulo. Tiel vera reĝo ne kondukis. La ribelantoj havis ŝancon savi siajn vivojn, ĉar ili estis malliberigitaj nur la 21-an de februaro 1621. La ekzekuto la 21-an de junio 1621 montris forton de Habsburgoj. Tiam pri nacienco, lingvo aŭ religio ne temis. Tio estis politika afero – puno por perfido de la imperiestro. Ne ĉiuj ribelantoj estis ĉeĥoj. Ekzemple estro de la ribelantoj, la grafo **Henriko Matiaso Turn** estis tirola germano, kiu ne parolis ĉeĥan. Li ne estis ekzekutita, ĉar fuĝis kaj fariĝis eĉ kampa marŝalo de sveda armeo. La ekzekutisto, kiu kun sia teamo ekzekutis 27 ribelantojn, ne estis germano, sed sperta kaj estimata ĉeĥa ekzekutisto **Jan Mydlář**.

Sileziaj nobeloj, kiuj ĝustatempe pardonpetis, ne estis punitaj kaj iliaj propraĵoj ne estis konfiskitaj.

Germanizado

Germane parolantaj homoj vivis en niaj landoj precipe ekde la 13-a jarcento, kiam Primislidoj invitis germanajn kolonistojn. En la 16-a jarcento ĉeĥe parolantaj nobeloj, kiuj ne sciis bone mastrumi, volonte vendis siajn bienojn al eksterlandanoj, kiuj parolis germanan, francan, italan, hungaran k. a. La germanizado ne estis celo de Habsburgoj, nur Jozefo la 2-a

Habsburga (1741-1790), kiu volis krei fortan ŝtaton, tre preferis germanan lingvon. Sed li ankaŭ ĉeĥan lingvon sciis.

En armeo oni uzis germanan lingvon precipe por raportoj kaj komandoj inter staboj. Soldatoj, kiuj ofte apartenis al negermanaj nacioj, devis scii kaj obei nur kelkajn germanajn komandojn, kiujn ili kapablis facile ellerni. Se en iu regimento unu kvinono da soldatoj parolis iun lingvon, tiu lingvo fariĝis regimenta lingvo (ekzemple, se en la regimento kvinono da soldatoj parolis ĉeĥan kaj aliaj soldatoj parolis germanan, la regimento havis du regimentajn lingvojn: germanan kaj ĉeĥan).

Habsburgaj ĉefprincoj devis lerni lingvojn de ĉiuj nacioj de la monarĥio. Ekzemple Francisko Jozefo la 1-a, krona reĝido **Rudolfo Habsburga** k. a. parolis ĉeĥan.

Jezuitoj

Jezuitoj alvenis ne post la batalo apud Blanka Monto (1620), sed jam en la 16-a jarcento, dum regado de Ferdinando la 1-a Habsburga, en la jaro 1556. Lingvo de katolikoj (ankaŭ jezuitoj) ne estas germana lingvo, sed latina lingvo. Celo de jezuitoj estis nek helpo al Habsburgoj nek germanizado de ĉeĥoj. Ili okupiĝis pri instruado, edukado de loĝantaro, tial ili devis bone scii ĉeĥan lingvon.

Jezuito **Martin Středa** (polo) helpis al franca militestro **Raduit de Souches** defendi Brnon kontraŭ svedoj (1645). Jezuito **Jiří Plachý-Ferus**, kiu estis 194 cm alta, kun siaj studentoj heroe defendis Pragon kontraŭ svedoj (1648). Jezuito **Bedřich Bridel**, verkisto kaj poeto, kiu laboris en Kutná Hora, mortis dum pesta epidemio, kiam li infektiĝis zorgante pri malsanuloj.

Jezuito **Bohuslav Balbín**, instruisto kaj historiisto, verkis ekzemple latinan libron „Defendo de slava lingvo, precipe ĉeĥa lingvo“ („*Dissertatio apologetica pro lingua Slavonica, precipe Bohemica*“) en kiu li defendis ĉeĥan lingvon.

Fanatika jezuita pastro **Antonín Koniáš**, kiu neniigis grandegan amason de libroj, estis nur escepto. Kiam jezuitaj estroj eksciis, ke Koniáš al ili faras malbonan reklamon, ili lin izolis.

En praga Klementino jezuitoj eldonis multe da valoraj libroj, inter ili eĉ kelkajn verkaĵojn de nekatoliko **Jan Ámos Komenský**. Kuzo de Jiří Plachý-Ferus, kiu havis la saman nomon (Jiří Plachý), estis direktoro de jezuita biblioteko, presejo, verkisto. Li verkis pli ol 50 ĉeĥajn librojn, inter ili estis tre populara „*Zlatý nebeklič*“ („Ora Ŝlosilo de la Ĉielo“), kiu en la jaroj 1638-1889 estis 237-foje eldonita!

Jezuitoj ludis teatron kun helpo de kredantoj kaj fakte renovigis kristanan kulturon de la lando, kies loĝantoj kaŭze de longtempa milito perdis iu ajn kredon.

Jes, kelkaj nekatolikaj elmigrintoj, ekzemple Komenský, estis herooj, sed pli grandan signifon por nia patrujo havis tiuj loĝantoj, kiuj restis kaj laboris ne eksterlande, sed hejme.

Svedoj

Antaŭ fino de tridekjara milito svedoj volis konkeri Vienon. Sed sveda armeo sub la gvido de **Lennart Torstenson** pro tio bezonis konkeri Brnon. Defendantoj de la urbo Brno sub la gvido de **Jean-Louis Raduit de Souches** kaj jezuito Martin Středa pli ol tri monatoj (ekde la 3-an de majo ĝis la 15-an de aŭgusto 1645) sian urbon sukcese defendis.

En Brno ni ĉiujare en aŭgusto tion solenas kaj tio estas **nek soleno de Habsburgoj nek soleno de germanizado**.

Svedoj apud Brno ne sukcesis. Revenante norden ili volis konkeri Pragon. Antaŭe svedoj atakis Pragon en la jaro 1635 kaj eĉ dufoje en la jaro 1639. Sveda generalo **Johan Gustafsson Banér**, kiu havis ĉeĥan edzinon, publikigis ĉeĥlingvajn afiŝojn, ke svedoj volas liberigi ĉeĥojn de Habsburgoj. Sed ĉeĥoj tiun svedan propagandon bojkotis. En sveda armeo batalis ĉeĥaj religiaj elmigrintoj (nekatolikoj), kiuj volis reveni en sian eksan patrujon. Al svedoj helpis moraviaj evangelikaj valaĥoj (1640-1642), kiuj ribelis kontraŭ Habsburgoj. Svedaj soldatoj instruis popolon fumi tabakon, ĉar kamparanoj ĝis tiu tempo la tabakon ne sciis.

En majo 1648 sveda marŝalo **Carl Gustav Wrangel** anstataŭis nesukcesan, malsanan Torstensonon per militestro **Hans Christoff Königsmarck**, al kiu helpis kampa marŝalo **Arvid Wittenberg von Debern** kaj poste **Karolo la 10-a Gustav**. Kaŭze de ĉeĥa perfidulo **Arnošt Ottovaldský** svedoj preskaŭ senbatale konkeris la duonon de Prago (Malá Strana) kaj povis elrabi Pragan Kastelon. El restaĵoj de kolektoj de **Rudolfo la 2-a Habsburga** svedoj ŝtelis ekzemple grandegan libron *Codex Gigas* (Diabla Biblio), 500 bildojn, 70 bronzaĵojn, 370 sciencajn ilojn, 400 indiaĵojn, multe da koraloj, sukceso, eburo kaj diamantoj. Ĉion sur boatoj transportis tra riveroj Vltava kaj Elbo en maron kaj en Svedion. Neniam svedoj al ni redonis, kion iliaj soldatoj en la jaro 1648 en Prago ŝtelis.

Svedoj volis konkeri tutan Pragon, sed praganoj bone sciis, ke svedoj mortigus ĉiujn, tial ili sian urbon defendis. Ekde la 26-an de majo ĝis la 3-an de novembro 1648 (101 tagojn) studentoj, hebreaĵoj, monaĥoj, metiistoj k. a. urbanoj kun nemultaj soldatoj (katolikoj kaj nekatolikoj) batalis kontraŭ spertaj kaj bone armitaj svedaj soldatoj. Praganoj havis nur du pafilegojn. Ili ofte uzadis improvizitajn armilojn, eĉ husanajn draŝilojn. Inter defendantoj de Prago batalis ekzemple jezuito Jiří Plachý, pentristo **Karel Škréta Šotnovský el Závoričice**, natursciencisto **Jan Marek Marci el Kronland**. La milito finis jam la 24-an de oktobro 1648, sed en Prago oni batalis ĝis la 3-an de novembro 1648.

Malkonstruado de Maria Kolono

La 3-an de novembro 1918, en la kvina tago de sendependa Ĉeĥoslovaka Respubliko, kiu ekestis la 29-an de oktobro 1918, vandaloj sub la gvido de ĥuligano el Žižkov (nuntempa urba kvartalo Prago-Žižkov) **František Sauer-Kysela** la Marian Kolonon neniigis.

Kiu estis Sauer? Li devenis el malriĉa familio. Ambaŭ liaj gepatroj estis analfabetoj. Lia patro okupiĝis pri diversaj profesioj, lia patrino estis servistino. Sauer naskiĝis kiel la sepa el iliaj ok infanoj en Žižkov en la jaro 1882. Li ne finis mezlernejan lernadon, fariĝis seruristo, loĝis kun siaj patrino kaj fratino en Žižkov, okupiĝis pri diversaj profesioj. Kelkfoje li estis monpunita, eĉ malliberigita pro kontrabando de kokaino, poste li maĥinaciis kun loĝejoj en Prago. Li fakte estis neniu patrioto aŭ brava batalanto kontraŭ Habsburgoj, nur krimulo, kiu agis nur por siaj propraj interesoj. Politike li nelonge apartenis al socialaj demokratoj, sed baldaŭ li anarĥistiĝis. Li verkis librojn, amikiĝis kun pragaj bohemoj (ekz. **Jaroslav Hašek**). Li finance helpis al Jaroslav Hašek eldoni la 1-an kaj la 2-an volumon de la libro pri aventuroj de brava soldato Ŝvejk. Dum la dua mondmilito en la jaro 1945 li pro disvastigado de afiŝoj kun Masaryk estis malliberigita en Terezín. Li mortis de tuberkulozo en la jaro 1947.

En la jaro 1923 Sauer proprakoste eldonis la libron, kie li priskribas sian vandalan agon el la jaro 1918. La libro havas iomete nelogikan kaj longan nomon: „Nia kanajlaro, jezuitoj kaj diplomatoj. Historia dokumento pri malkonstruo de maria kolono en Prago. Ĉefo de „kanajlaro“ Franta Sauer-Kysela el Žižkov tion verkis“. - En la libro Sauer kiel Herostratos fanfaronas per sia malbona ago kaj detale priskribas ĝian preparadon:

SAUER: „La 31-an de oktobro 1918 mi kun miaj amikoj Jan Neruda (*tio ne estis fama poeto Jan Neruda, 1834-1891*), Josef Tuháček kaj A. Hykeš iris en Pragon. Ĉe Laborista Domo en Hiberna Strato nin haltis redaktoro Jan Skála. Li min kaj Nerudan instigis al konfida dialogo. Li diris: „**Ekzekutiva komitato de socialdemokrata partio dum sia renkontiĝo voĉdonis por malkonstruado de maria kolono.**“

Socialdemokrato Skála petis eksan partionon Saueron malkonstrui Marian Kolonon. Anarĥisto Sauer jesis kaj fervore aranĝis tutan agadon, precipe helpon de kvar ne pragaj sed žižkovaj fajroestingistoj, kies komandanto estis Bedřich Zedníček, amiko de Sauer. Krom tio Sauer pretigis ĉaron kun koĉero kaj paro da ĉevaloj, kablonojn, krikojn, latojn, sufiĉe longan eskalon. En la agado partoprenis ĉirkaŭ centoj da amikoj de Sauer. La 3-an de novembro 1918 je la 14-a horo duono da vandaloj vagis tra Malnovurba Placo en Prago kaj najbaraj stratoj, alia duono partoprenis en manifestacio sur Blanka Monto. Kiam amaso da homoj revenis el la manifestacio en Malnovurban Placon, Sauer kun helpo de fajroestingistoj kaj amikoj la Kolonon malkonstruis. Laŭ popola legendo la kablono ĉirkaŭ kolo de statuo de Virgulino Maria bindis tiam 16-jara **Milada Horáková**, sed tio ne estas vero. Sauer priskribis, ke unu timigita maljunulino eĉ genufleksis en la loko, kien Sauer planis la Kolonon faligi, petante Saueron, ke li ne malkonstruu la Kolonon. Sed fanatigita kanajlaro ŝin mokis: „Ni emtombigos la sinjorinon sub ruinoj de la kolono!“ Homoj mokis ankaŭ tri membrojn de Nacia Komitato, kiuj volis la malkonstruon preventi. Inter homoj, kiuj en la agado partoprenis, estis nacia socialistino **Fráňa Zemínová**, poeto **Jaroslav Seifert** kaj historiisto **Václav Vilém Štech**, kiu el niĉo de la Kolono en lasta momento savis raran gotikan bildon de Virgulino Maria Rejna.

Kontraŭ malkonstruo de Maria Kolono protestis skulptisto **Josef Václav Myslbek**. Pentristino **Zdeňka Braunerová** metis al malkonstruita Kolono florkronon kun la skribo „Mi plennome protestas. Zdeňka Braunerová.“ Ankaŭ membroj de Nacia Komitato protestis.

Reakcio de ĉeĥoslovaka prezidento **Tomáš Garrigue Masaryk** estis surpriza: „**Se prapaganoj la statuon forprenis, mi ĝojas, ĉar la statuo estis nia politika malhonorigo.**“

Sed rakonto de Sauer interese kontinuas. La 4-an de novembro 1918 (unu tago post la vandala ago) li estis invitita en redakcion de la ĵurnalo *Právo lidu* (Popola Rajto), kie **kasisto de socialdemokrata partio donis al li 100 kronojn pro „laboro“**.

En la jaro 1919 Franta Sauer estis juĝita pro malkonstruo de la Kolono, sed neniam li estis punita. Liaj protektantoj (verŝajne socialaj demokratoj) al li certe helpis.

Antaŭ sia morto en la jaro 1947 Sauer, krimulo kaj kruda anarĥisto, sian malbonan agon sincere bedaŭris. Tio estas bele priskribita en poemo de **Václav Renč** *Pražská legenda* (Praga Legendo), kie Sauer havas la nomon Oskar.

Konstruado

Baldaŭ post malkonstruado de la Kolono piuloj kolektis monon. Inter kredantoj precipe la membroj de katolika sporta organizacio Orel (Aglo) estis tre agemaj. Sed ili ne estis sukcesaj. En la jaro 1990 estis fondita Societo por Renovigo de Maria Kolono, kiu petis permeson de pragaj urbodomanoj en la jaroj 1992, 2005 kaj 2007. **La konstruado ne estos pagita per mono de la ĉefurbo Prago aŭ ŝtato, nur per financaj kontribuoj de kredantoj (katolikoj)**. En la jaro 2017 estis eldonita permeso de la konstruado. Sed kiam angulŝtono kun ĉeĥaj, anglaj, germanaj kaj latinaj skriboj „**Ĉi tie Maria Kolono staris kaj denove staros**“ estis instalita, pragaj urbodomanoj la vortojn „kaj denove staros“ forĉizigis.

Precipe en la jaroj 2018-2019 multe da diversaj „estetikuloj“ eksvarmis. Malamikoj de la renovigo, al kiuj apartenas sociala demokrato **Jiří Paroubek**, komunistino **Marta**

Semelová, verkistino kaj batalantino kontraŭ redono de nerajte konfiskita propraĵo al eklezioj
Lenka Procházková, emerita pastoro kaj nekatolika teologo **Petr Černý**, deputisto de Civitana Demokrata Partio en Eŭropa Parlamento **Jan Zahradil**, kiu eĉ pri si mem france diris: „Mi estas Sauer.“ („*Je suis Sauer.*“), k. a., batalas per peticioj kaj helpe de amaskomunikiloj.

Ekde la jaro 1995 skulptistoj **Petr Váňa**, **Jan Bradna**, **Miroslav Krátký** kaj **Karel Kronych** preparas la Kolonon. En la jaroj 2000 – 2002 Petr Váňa kreis statuon de Virgulino Maria. (Tiu artisto jam pli ol 15 jaroj laboras **senpage!**) Konstruado de Maria Kolono komenciĝis la 17-an de februaro 2020.

Ni esperu, ke kun helpo de Dio ĝis oktobro 2020 la kolono estos renovigita.

Registro (personoj kaj datoj)

Balbín, Bohuslav (1621-1688), jezuito, instruisto, historiisto;
Albreĥto Aŭstria Habsburga (1397-1439), bofilo de Sigismundo Luksemburga;
Banér, Johan Gustafsson (1596-1641), sveda militestro;
Bendl, Jan Jiří (1620–1680), baroka skulptisto;
Bořita el Martinice, Jaroslav (1582-1649), guberniestro;
Bradna, Jan – skulptisto;
Braunerová, Zdeňka (1858-1934), pentristino;
Bridel, Bedřich (1621-1688), jezuito, poeto, kiu zorgis pri malsanuloj en Kutná Hora;
Černý, Pavel (*1949), emerita pastoro, teologo, predikanto;
Fabircius, Filip (ĉirkaŭ 1570-1631), skribisto
Ferdinando la 1-a Habsburga (1503-1564), imperiestro;
Ferdinando la 2-a Habsburga (1578-1637), imperiestro;
Ferdinando la 3-a Habsburga (1608-1657), imperiestro;
Ferdinando la 4-a Habsburga (†1654), li neniam regis;
Frederiko Palatinata (1596-1632), germano, ĉeĥa reĝo
Francisko Jozefo la 1-a Habsburga (1830-1916), imperiestro;
Georgo el Kunštát kaj Poděbrady (1420-1471), ĉeĥo, bohemia reĝo;
Goldschneck, Stanislav, baroka skulptisto;
Harrach, Arnošt (†1667), grafo, kardinalo, kiu sanktigis la Kolonon;
Hašek Jaroslav (1883-1923), ĉeĥa verkisto, praga bohemo, aŭtoro de libro pri brava soldato Ŝvejko;
Heidelberger, Arnošt Jan, baroka skulptisto;
Herostratos (†356 a. K.), greka viro, kiu bruligis templon de la diino Artemis en Efesos nur por famiĝi;

Hoffkirk, Laŭrenco, la saksa kolonelo, kiu en la jaro 1632 malhonoris la paladion; poste li la paladion ŝtelis kaj volis por ĝia redono al ĉeĥoj 100 000 da florinojn, kiujn li ricevis;

Horáková, Milada (1901-1950), nacia socialistino, kiu estis ekzekutita de komunistoj;

Hřib, Zdeněk (*1981), kuracisto, nuntempa praga urbestro el politika movado Piratoj;

Hus, Jan (1371? – 1415), reformisto de romkatolika eklezio;

Jirásek, Alois (1851-1930), mezlerneja instruisto, verkisto;

Johano Luksemburga (1296-1346), bohemia reĝo;

Jozefo la 2-a Habsburga (1741-1790), imperiestro, kiu reformis monarĥion;

Karolo la 4-a (1316-1378), bohemia reĝo, romia imperiestro;

Karolo la 10-a Gustav (1622-1654), sveda militestro;

Komenský, Jan Ámos (1592-1670), episkopo, pedagogo, filozofo, verkisto, humanisto;

Koniáš, Antonín (1691-1760), jezuito, pastro, religia fanatiko, kiu fervore bruligis ĉeĥlingvaj kaj germanlingvaj librojn;

Königsmarek, Hans Christoff (1605-1663), sveda generalo, kies soldatoj elrabis Pragan Kastelon;

Krátký, Miroslav, skulptisto;

Kronych, Karel, skulptisto;

Ludoviko Jagela (1506-1526), juna reĝo, kiu mortis post batalo kontraŭ turkoj apud Mohács;

Marci el Kronland, Jan Marek (1595-1667), natursciencisto;

Masaryk, Tomáš Garrigue (1850-1937), profesoro, la unua ĉeĥoslovaka prezidento;

Matiaso Korvino (1443-1490), hungara reĝo, en la jaroj 1469-1490 kontraŭreĝo en Moravio;

Melbera, Abraham, baroka skulptisto;

Mydlář, Jan (1572-1664), ĉeĥa ekzekutisto;

Myslbek, Josef Václav (1848 -1922), skulptisto;

Paroubek, Jiří (*1952), sociala demokrato;

Plachý-Ferus, Jiří (ĉirkaŭ 1606-1664), jezuito, rektoro, defendanto de Prago, kies kuzo, jezuito Jiří Plachý en praga Klementino eldonis multe da valoraj ĉeĥaj libroj;

Procházková, Lenka (*1951), verkistino, malamikino de katolikoj;

Raduit de Souches, Jean-Louis (1608-1682), franca militestro, defendanto de Brno (1645);

Renč, Václav (1911-1973), katolika poeto, kiu estis en socialisma juĝa proceso kontraŭ edukitaj katolikoj (tiel nomata „*Zelená internacionála*/Verda Internaciano“) kondamnita por „ŝtatperfido“ por maljusta puno de 25 jaroj de malliberejo en Leopoldov;

Rudolfo Habsburga (1859-1889), ĉefprinco, filo de Francisko Jozefo la 1-a;

Rudolfo la 2-a Habsburga (1552-1612), imperiestro;

Sauer/Kysela, František (1882-1947), metiisto, kontrabandisto, ĥuligano el Žižkov;

Seifert, Jaroslav (1901-1986), fama ĉeĥa poeto;

Semelová, Marta (*1960), komunistino;

Sigismundo Luksemburga (1368-1437); imperiestro, nelonge bohemia reĝo;

Slavata el Chlum kaj Košumberk, Vilém (1572-1652), guberniestro;

Středa, Martin (1587-1649), pola jezuito, defendanto de Brno (1645);

Šaloun, Ladislav (1870-1946), skulptisto;

Škréta Šotnovský el Závoriče, Karel (1610-1674), pentristo;

Štech, Václav Vilém (1885-1974), historiisto;

Torstenson, Lennart (1603-1651), sveda generalo, kiu volis konkeri Brnon (1645);

Turn, Henriko Matiaso (1567-1640), tirola germano, kiu ne parolis ĉeĥan, estro de ribelantoj (1618), poste sveda kampa marŝalo;

Váňa, Petr (*1965), skulptisto;

Venceslao la 3-a (1286-1306), lasta reĝo el ĉeĥa dinastio Primislidoj;

Vladislao Jagela (1456-1516), bohemia reĝo;

Wittenberg von Debern, Arvid (1606-1657), sveda kampa marŝalo;

Wrangel, Carl Gustav (1613-1676), sveda marŝalo;

Zahradil Jan (*1963), ĉeĥa liberala politikisto, kiu pri si mem diris: „Mi estas Sauer.“;

Zemínová, Fraňa (1882-1962), nacia socialistino, kiu malamis katolikojn.

Rekomendita literaturo

- ANEV, P. 2012: Procesy s údajnými přísluhovači Zelené internacionály. Paměť a dějiny 4, 23-34.
- BRADNA, J. & KAVIČKA, K. 2008: Mariánský sloup na Staroměstském náměstí. Církevní památky, vol. 42, 1-a eld., Velehrad, Historická společnost Starý Velehrad se sídlem na Velehradě, 60 paĝoj.
- FISCHER, O.A. 2011: Husanaj militoj kaj bohemia reĝo Georgo de Poděbrady. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 8-an de junio 2011. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer-husanaj...pdf
- FISCHER, O.A. 2011: Karolo la pli Aĝa de Žerotín. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 2-an de novembro 2011. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer-zerotin.pdf
- FISCHER, O.A. 2013: Jan Blahoslav. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 11-an de decembro 2013. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer_jan-blahoslav.pdf
- FISCHER, O.A. 2016: Jezuitoj. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 14-an de septembro 2016. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer-jezuitoj_160917.pdf
- FISCHER, O.A. 2018: Tabako kaj ĝiaj fidelaj sklavo. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 17-an de januaro 2018. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer-zerotin.pdf
- FISCHER, O.A. 2018: Biblio de Kralice. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 20-an de junio 2018. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer-Biblio...pdf
- FISCHER, O.A. 2018: Zdeněk Matěj Kuděj (1881-1955). Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 20-an de junio 2018. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer_zdenek-matej-kudej...pdf
- FISCHER, O.A. 2019: Miaj rilatoj al Pollando. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 27-an de februaro 2019. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer_Miaj...pdf
- KRATOCHVÍL, M.V. 1979: Podivuhodné příběhy a dobrodružství Jana Kornela. 8-a eld., Prago, Albatros, 256 paĝoj.
- KUČEROVÁ, S. 2020: Mariánský sloup. www.nova.republika.cz, 10.2.2020.

- KYSELA, F. 1923: Franta Habán ze Žižkova. Obrázky z doby popřevratové. La 1-a kaj 2-a volumoj, 1-a eld., Praha, Ladislav Šotek, 512 paĝoj.
- MALÝ, R. 2006: Katolíci ve stínu hákového kříže. 1-a eld., Frýdek-Místek, Michael, s. a., 121 paĝoj.
- MICHÁLEK, J. & FERJENČÍK, M. 2015: Mariánský sloup nebude financován z pražského rozpočtu. – <https://praha.pirati.cz/mariansky-sloup.html>
- SAUER, F. 2018: Naše luza, jezuité a diplomaté. Historický doklad svržení mariánského sloupu na Staroměstském náměstí v Praze. Napsal náčelník „luzy“ Franta Sauer-Kysela ze Žižkova. 2-a eld. (1-a eld., proprakoste en Prago, 1923), Praha/Dvůr Králové, Nakladatelství Anarchistické federace a Barbora Machová, 24 paĝoj.
- PEJŘIMOVSKÝ, F. 2018: Mariánský sloup na Staroměstském náměstí v Praze. Památník vítězné bitvy. 1-a eld., Praha, Josef Pejřimovský, 31 paĝoj.
- PROCHÁZKOVÁ, L. 2019: Sázka na krále aneb Už nikdy nesázejme na cizí krále – Projev Lenky Procházkové 21.6.2019 na Staroměstském náměstí – www.facebook.com/lenkaprochazkova.official - 12.2.2020.
- PROKEŠ, J. 2020: Je rozhodnuto: Mariánský sloup se vrací na Staroměstské náměstí. www.denik.cz/regiony/je-rozhodnuto 23.1.2020.
- RENČ, V. 2017: Pražská legenda. 5-a eld., Svitavy, Trinitas, 39 paĝoj.